Laŭzana Esperanto-Societo
Junio 2019 - no 6

# Laŭzana informilo

## Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 2-an de septembro *Prezentado de libro*
- Lu, la 7-an de oktobro *Decidota*
- Lu, la 4-an de novembro *Decidota*
- Sa, la 14-an de decembro *Zamenhofa Festo*

## Sabate, la 22an de junio 2019

## Jara ekskurso ĉe *"Camille Bloch"*

Invitu viajn amikojn partopreni nian vojaĝon al *Courtelary* por viziti ĉokoladan firmaon.

## Programo:

Jen kelkaj informoj pri nia ekskurso en Berna Ĵuraso.

- **Trajna vojaĝo** tra Bielo.

**ĉiu mem aĉetas sian trajnan bileton.**

*La orientuloj foriros el Vevey kajo 1, je 7h55 kaj alvenos Laŭzanen je 8h10 / kajo 8.*

*Por ĉiuj, la trajno foriros el Laŭzano, kajo 7, je 8h15 ĝis Courtelary (9h51).*

*Ni ŝanĝos en Bielo (9h15 / kajo 3 - 9h20 / kajo 1).*

- **Vizito** de la ĉokolada firmao "Camille Bloch" je la 10a.

*(Gvidisto, speciale por ni, ĉiĉeronos dum pli ol 90 minutoj en la* "Malkovra Vizitvojo".

*Certe ni povos gustumi dolĉaĵojn).*

- **Tagmanĝo** *"Ĉe Kamij"* je la 12a.

**Menuo**:

Miksita salato

Trutaj flankoj kaj migdaloj, vaporumitaj terpomoj kun legomaj bastonetoj,

Ĉokolada *deserto "Camille Bloch".*

**Prezo:**

La vizito kaj la manĝo (sen la trinkaĵoj) kostos **Fr 25.-**

(pagota al CCP 10-26785-8)

## La komitato informas

**Sabata bazaro en *La Palud***
la 29an de junio
la 13an de julio
la 17an de aŭgusto
la 14an de septembro

**La babiladaj rondoj je la 19a**

*doodle.com/poll/8dk45bkb8brdf2nd*

**Okcidente**:

**ve, la 31an de majo**
ĉe Rosario Scopelliti,
ch. de Barberine 6
en 1004 Lausanne
021 648 76 44 / 079 264 41 08

*doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6*

**Oriente**:

**ve, la 7an de junio**
ĉe Pierrine Bonjour, Pinsons 4,
Vevey, 079 883 10 37

**Ambaŭgrupe**:
**ve, la 20an de septembro**
Francisko invitos nin
ĉe Espace Dickens

**104a UK en Lathi - Finnlando**
de la 20a ĝis la 27a de julio
**86a Itala kongreso en Trieste**
de la 24a ĝis la 31a de aŭgusto

## Laŭzana Esperanto-Societo

ĉe F. Randin, ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

**Komitato 2019**
Prezidanto: Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario: François Randin (076 369 29 17)
Kasisto: Françoise Pétermann(079 517 44 43)
Redaktoro: Rosario Scopelliti (079 264 41 08)




## Karlo de Edmond Privat   sesa ĉapitro: *La ideoj de Karlo*

Karlo estis tre pensema kaj jam havis precizajn ideojn pri multe da aferoj. Dum la aliaj infanoj malfacile komprenis geografion, li tre bone prezentis al si la formon de la mondo: Post la montoj estas maroj, teroj kaj denove montoj ĝis la du ekstremaĵoj de la mondo. Tie sendube estas muro aŭ barilo, kiel sur ia ponto, por malhelpi, ke la personoj falu en abismon.

Karlo tre deziris iri iam al unu el tiuj ekstremaĵoj de la mondo. Certe estus strange vidi nenion plu antaŭen: nur la bluan ĉielon supre, kaj sub ĝi . . . nenion. Li sin demandis, kien falus iu homo, kiu estus forsaltinta de l' ekstremaĵo de l' mondo. Se li posedus la aeroplanon de la riĉa sinjoro, kiun konas lia patro, li provus flugi malsupren sub la mondon kaj reveni supren ĉe la alia flanko. Li deziris scii, kiaestas la subaĵo de la mondo.

Karlo demandis sian patron pri tio. S-ro Davis estis tre amuzata de la ideoj de Karlo kaj klarigis al li, ke la mondo estas kvazaŭ grandega oranĝo, rondiranta ĉirkaŭ la suno, kiu estas ankaŭ tre granda globo. Ĉiuj steloj kaj la luno estas ankaŭ globoj. La patreto klarigis al Karlo, ke la homoj vivas sur la tuta terglobo. Sed Karlo ne povis kredi tion kaj pensis, ke certe lia patro eraras. Kiel la homoj povus stari sub la tero?

Tiu demando lin multe priokupis, kaj li ŝajnis pripensadi dum la tuta tagmanĝo post la respondo de sia patro. Lia patrineto promesis ke, kiam li scios bone legi, ŝi aĉetos por li ilustritan libron pri tiuj aferoj.

Karlo havis grandan admiron al ĉiuj metiistoj, al ĉiuj manlaboristoj. Kun sia patrino li jam vizitis la paniston kaj vidis lin bakanta la panojn. Li vidis la ŝufariston enpikanta najlojn en la ŝuojn per martelo. Li eĉ vidis ie en la urbeto grandan ĉambron, kie multegaj junulinoj fabrikas ĉapelojn por sinjorinoj. Ili aranĝis rubandojn kaj plumojn sur la ĉapelo. Pasante apud granda hotelo, ili vidis, tra malaltaj fenestretoj, grandan kuirejon, kie multaj viroj, kun blankaj antaŭtukoj kaj ĉapoj, movis pladojn kaj kaserolojn kun granda bruo. Odoro de rostaĵo alvenis al la nazeto de Karlo.

En la stratoj ĉiu ŝajnis rapidi: knabo puŝis veturileton ŝarĝitan je pakaĵoj; maljuna lama viro kriante vendadis ĵurnalojn. S-ino Davis klarigis al sia filo, ke ĉiuj homoj laboras por gajni monon kaj aĉeti siajn vestojn kaj nutraĵojn kaj tiujn de sia familio.

Ankaŭ tio multe pensigis Karlon. "Kion faras patreto?" li demandis. La patrineto kondukis lin al la oficejo de sia edzo; kaj li vidis sian patron skribanta sur granda librego ĉe alta tablo. Karlo opiniis, ke lia patro havas tre enuigan profesion kaj li decidis, ke li mem preferos fariĝi kuiristo en hotelo aŭ veturigisto.



Parzival kaj liaj verdaj ŝuoj.

## Ekskursa rehejmiĝo

**Por la reiro, ni proponas du eblecojn.**

**1) De Courtelary trajne al Bielo kaj ŝipe al Neuchâtel kaj trajne al Laŭzano / Vevey.**

*- Foriro el Courtelary je 13h51 / kajo 2.*
*- Alveno en Bielo je 14h12 / kajo 1.*
*- Buse aŭ piede (750 metroj) al la haveno.*
*- Foriro de la ŝipo je 14h45 el Bielo.*
*- Alveno en Neuchâtel je 17h15.*
*- Buse aŭ piede al la trajno de 18h03 / kajo 3.*
*- Alveno en Laŭzano je 18h45 / kajo 7.*
*- Trajno al Vevey je 18h50 / kajo 3.*
*- Alveno je 19h03 en Vevey.*

Duontarifa prezo: 61.30
de Laŭzano al Courtelary: 21.-
de Courtelary al Bielo: 5.80
Ŝipo de Bielo al Neuchâtel: 21.-
de Neuchâtel al Laŭzano: 13.50

**Anstataŭe uzu CFF-an malaltprezan tagbileton**
(Carte journalière dégriffée: 49.-)
aŭ komunuman tagbileton:
Montreux 45.- / Vevey 43.- / Laŭzano 49.-

**2) Vizito ĉe Parzival en Sonceboz-Sombeval. kaj ĉe skulptaĵo en Bielo. Trajne al Laŭzano / Vevey.**

*- Foriro el Courtelary je 14h08 / kajo 2.*
*- Aveno en Sonceboz je 14h20.*
*- Vizitoĉe Serge Reverdin t.n.Parzival.*
*- Foriro el Sonceboz je 15h22 / kajo 2.*
*- Alveno en Bielo je 15h40 / kajo 1.*
*- Vizito al la skulptaĵo ĉe la staciplaco kaj kafumado.*
*- Foriro el Bielo je 16h45 / kajo 5*
*- Alveno en Laŭzano je 17h45 / kajo 7.*
*- Foriro al Vevey je 17h50 / kajo 1. Alveno 18h03.*

**Duontarifa prezo: 42.-**
de Laŭzano al Courtelary: 21.-
aŭ serĉu malaltprezan bileton
(Billet dégriffé)
Eblas ankaŭ grupbileto,
kontaktu min: 076 369 29 17

